


BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



Nro 3

Majo 1953

Aperas laŭbezone

PROGRAMOJ DE KLUBAJ VESPEROJ EN MAJO 1953

6.5.	Artisma vespero	Marta Ledková, Eli kaj Št. Urbanovi
13.5.	Mateřský jazyk ukazovatelem naší vyspělosti	Julie Šupichová
20.5.	Kroniko el esperantista mondo	Jaroslav Mařík
27.5.	Klubaj aktualaĵoj	Jaroslav Šustr

- - -

Programo de ARTISMA VESPERO la 6an de majo en nia kubejo
"U Šumavy", Štěpánská str., Praha II.

I.

Enkondukaj vortoj	Štěpán Urban
TRA L'SILENTO	Dolĉa nokto
poemaro de	Barkarolo
Edm. Privat	Venĝantaj sonoj
muziko Št. Urban	Lasta kiso
STREĈITA KORDO	
K.Kalocsay -	Printempo
Št.Urban	En la memorlibron de knabino
LA VAGABONDO KANTAS	Piedpinte paŝu sento
Julio Baghy -	Gaja papilio
Št.Urban	Silentas mi
	Kantas MARTA LEDKOVÁ Akompanas Eli Urbanová

II.

NÁRODNÍ PÍSNĚ	Na lávce nad potokem	
	Já nechci žádného	
	Šla panenka k zpovídání	Zpívá MARTA LEDKOVÁ
Karel Havlíček Borovský	BAPTO DE CARO VLADIMIRO	Doprovází Eli Urbanová

I - II - III

Trad. Dr. Tomáš Pumpr	Prezentas Št.Urban
-----------------------	--------------------

.

"Kanto pri la artikolo"	
"Sole mi, ĉiam mi ..."	Verda folkloro Kantas MARTA LEDKOVÁ

- - -

VIZITADU REGULE NIAJN KLUBAJN VESPEROJN !

UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO 1954

okazos en la nederlanda urbo Haarlem. Neniu el ni povos partopreni la kongreson nunjaran. Ĉu ni havos la eblecon manpremi la samideanojn en Haarlem?

- -

STENOGRAFIA KONKURSO

Kiu estras la ĉeĥoslovakajn stenografian sistemon Herout-Mikulík, stenografu ĉeĥlingve jenan frazon:

"Sp(olu)práce (nár)odů v(e) dnech honby (v)š(e)m lidem ot(e)vřena je naši ř(ečí)."

La literojn en krampoj ellasu, ĉar tiel aŭ estas ordinare en stenografio, aŭ la koncernaj vortoj estas sigloj (samoznaky). Se vi skribis ĝuste, la stenografiaj vortoj similas al normalaj latinaj literoj, kiuj formas nomon de nia lingvo. La solvon sendu al Adolf Staňura, Táborská 42, Ostrava - Radvanice, de kiu vi rekompence ricevos ŝlosilon al Esperanto-stenografio, bazita sur la sistemo HM.

- -

A V I Z O

La Esperanto-societo en MULHOUSE atingis, ke la samurba turisma oficejo (Syndicat d'Initiatives) aldonu E-presaĵon al la ilustrita franclingva turisma gvidilo de ĝi publikita. La direktoro de tiu S.I. promesis eldoni specialan ilustritan E-lingvan gvidilon, se la menciita E-presiĵo vekos sufiĉe da atento kaj intereso.

Samideanoj, skribu al la ĉi suba adreso, por ricevi la havindan gvidilon pri MULHOUSE, kun E-aldono. Sendu la adresojn de kvin el viaj konatoj, aldonante respondkuponon; ni sendigos al ili tiun tre efikan E-varbilon. Por ne forgesi, agu tuj!

"Esperanto-servo Turisma" 24, Fbg de Riedisheim, MULHOUSE (Francujo).

MONDA ESPERANTO-KRONIKO

AŬSTRUJO. En la urbo Graz estas antaŭ nelonge nomita Esperantoplaco.

BRITUJO. En la lernejo por la socia esplorado en Ipsden apud Oxford dum februaro okazis eksperimento kun samtempa instruado de itala lingvo kaj esperanto al tri diversaj grupoj. Nombro da filologoj, psikologoj kaj sociologoj sekvis la eksperimenton.

DANUJO. La komunuma biblioteko en Aarhus estos centra biblioteko por Danujo por literaturo en esperanto. Ĝi aĉetos ĉiujn iom gravajn verkojn aperintajn en nia lingvo.

ITALUJO. En Sicilio multaj instruistoj partoprenas esperanto-kursojn.

JUGOSLAVUJO. Miloj da novaj kursanoj estas raportataj en diversaj lokoj de la lando pro la okazonta kongreso.

SVEDUJO. La Sveda Somera Semajno en Frostavallen, internacia kurso, ĉi-jare pri la temo "Internacia Kulturinterŝanĝo", aranĝata de la Sveda Esperanto-Instituto, okazas sub la aŭspicioj de la Sveda Instituto por kulturaj rilatoj kun eksterlando kaj de la Sveda Unesco-konsilantaro. Partoprenontoj povas ricevi stipendiojn.

NEDERLANDO. En la nederlanda ĵurnalo "Wunschoter Courant" aperas 20leciona esprantokurso, kombinita kun parolaj lecionoj. La plej bonaj lernantoj vojaĝos por dek tagoj al Danujo aŭ Francujo je la kosto de la gazeto.

UNIVERSALA KONGRESO. La 24an de februaro estis aliĝintaj al la 38a UK en Zagreb 776 personoj. La poŝta ministerio decidis eldoni poŝtmarkon kaŭze de la kongreso.

- -

Eldonkvanto: 600

Venonta numero aperos komence de junio.